

nordfrancia esperanto-federacio jarraporto 2007

Membraro. — En 2007 la Nordfrancia Federacio enkalkulis, unuflanke, **5 asociojn-membrojn** (Arras, Boulogne-sur-Mer, Dunkerque, Lille kaj Valenciennes), t.e. same kiom en 2004–2006, kaj, aliflanke, **147 fizikajn membrojn** (172 en 2006) : 28 el Arras, 6 el Boulogne, 31 el Dunkerque, 33 el Lille, 29 el Valenciennes kaj 20 izoluloj. Sed plu estas malekvilibro inter la du regionoj Nord-Pas-de-Calais (ĉ. 90 % de la membraro) kaj Picardie (ĉ. 4 %).

Administro. — La **Federacia Komitato** kunsidis en Marto 2007 en Lille (Nord).

La 30^{an} de Septembro 2007 okazis la **federacia kongreso** en Arras (Pas-de-Calais). Tiam la membraro elektis novan 15-kapan Federacian Komitaton, kiu mem elektis novan kvarkapan Estraron daŭre prezidatan de Xavier Dewidehem. Tagmeze oni plantis novan Esperanto-arbon kun urbaj balotitoj. Posttagmeze disvolviĝis publika Esperanta-pola festivalo kun koncerto de JoMo kaj dancoj de pol-folkloro trupo, kadre de la oficiala departementa jaro de Pollando : ĝi renkontis grandan sukceson ĉe la neesperantista publiko.

La Federacio partoprenis la trian **Interfederacian Konferencon**, kiu kunigis responsulojn de la regionaj federacioj en la landa kongreso en Bourg-en-Bresse (Ain). Prezidanto Xavier Dewidehem tiam estis elektita sekretario (t.e. kunordiganto) de la Konferenco.

En Majo kaj Junio 2007 prezidanto Xavier Dewidehem vizitis ĉiujn asociojn-membrojn por senperaj interŝanĝoj inter la Federacio kaj la membroasocioj.

Komunikado kaj propagando. — La Federacio daŭre eldonas sian trimonatan revuon **Norda Gazeto** por ĉiuj siaj membroj ; paralele tri kluboj eldonas proprajn revuetojn. Ekde Septembro 2007 la Federacio luas la retregionon « esperanto-nord.org » por sia

informriĉa **federacia retejo** (www.esperanto-nord.org) kaj por retroŝtaj adresoj de siaj servoj, asocioj-membroj kaj fizikaj membroj. En la retejo pliriĉiĝis la esperantlingva versio, kiu baldaŭ enhavos ankaŭ turisman rubrikon. La Federacio aĉetis kaj disponigas pri la tri budaj kakemonoj de UFE kaj aliaj komunikiloj eldonitaj de UFE kaj JEFO, listigitaj en la Esperanta versio de la retejo.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj **neesperantistaj aranĝoj** : forumoj de la asocioj aŭ de la lingvoj, ekspozicioj, ktp. Ili organizis ankaŭ prelegojn en publikaj salonoj, en neesperantistaj asocioj kaj en lernejoj.

La Federacio rilatis al la nordfranciaj politikistoj kaj oficialiuloj kadre de : 1^o la kampanjoj de UFE okaze de la landaj balotoj, kun 14 favoraj respondoj kaj 10 skribaj parlamentaj demandoj ; 2^o la monda kampanjo por kandidatigo de UEA al la paca nobel-premio de 2008, kun kvin oficialuloj sendintaj kandidatigan leteron al la Nobel-komitato.

Instruado kaj ekzamenoj. — La diversaj kluboj organizis regulajn **dumjarajn kursojn** kaj inicajn staĝojn en klubejoj, lernejoj kaj universitatoj, kiuj kunigis pli ol 100 lernantojn.

Konforme al ĝia plurjara ekzamena politiko, la Federacio organizis **regionan ekzamensesion** en Lille (Nord) dum tuta dimanĉo la 24^a de Junio 2007 : ĝi enkalkulis la unuajn tri gradojn, kaj akceptis 15 kandidatojn (unu el ili samtage trapasis la unuajn du gradojn) — sukcesis ĉiuj el ili. La Federacio estis decidinta ekde 2005 organizi la ekzamenojn laŭ nova, tre kontentiga sistemo interkonsentita kun FEI : la Federacio mem ricevas de FEI ĉiujn rezultojn kaj diplomojn, kaj tiel povas tuj statistiki kaj plusendi la rezultojn al ĉiu ekzamenito kun gratulletero. Plie, la Federacio pagas mem la ekzamenkotizojn de la kandidatoj-federacianoj.

interfederaciakonferenco

Kulturo kaj aranĝoj. — Dum la 17^a kaj 18^a de Novembro 2007 okazis la 19^a **Eŭropa Rendevuo de Morbecque**, kiu sukcese akceptis centon da partoprenantoj el Francio, Belgio, Britio... Tie disvolviĝis kvingradaj staĝoj, koncerto de JoMo kaj prelego de Maryvonne Robineau pri la Kompostela Vojo.

La kluboj havas oftajn kontaktojn kaj renkontojn kun la belgaj kluboj de Kortrijk, Solre-sur-Sambre, Charleroi, k.a. Ili akceptis plurajn **eksterlandajn esperantistojn**, kaj plurfoje tiuokaze organizis publikajn prelegojn.

Fine, multaj federacianoj partoprenis esperantistajn kongresojn, renkontiĝojn aŭ staĝojn (francajn kaj eksterlandajn).

Venontaj projektoj. — La Federacio celas daŭrigi siajn ĉi-supre diritajn politikojn pri varbado, komunikado, instruado, ekzamenoj, kulturo, kunlaboro kun UFE...

En 2008 la Nordfrancia Federacio festos sian **centjarigon** ! Same la *Norda Gazeto* ! Dumjare okazos diverstipaj aranĝoj de la Federacio kaj la kluboj. Eldoniĝos kolektiva verko pri la historio de la nordfrancia movado.

Krome tiujare la **Eŭropa Rendevuo de Morbecque** okazos 20a-foje. Tial la tiujara Rendevuo estos speciala... kaj magia ! Ĝi ja daŭros tri tagojn (kontraŭ du antaŭe) de la 7^a ĝis la 9^a de Novembro 2008, kaj ĝuigos al la partoprenantoj riĉan kaj magian programon.

*Raportis : Xavier Dewidehem,
prezidanto de la Nordfrancia Esperanto-Federacio*